# *Mallonga Historio de la Budhana Ligo Esperantista*

**Geo H. Yoxon**
unua sekretario de Budhana Ligo Esperatista

Angla esperantisto, Arthur G. March, kiu estis ano de la Budhana Loĝio de la Teozofia Societo en Londono en 1925, ekpensis pri utilo, kiun povos porti Esperanto al la internaciaj rilatoj inter budhanoj en diversaj landoj de la okcidenta kaj orienta mondo.

En tiuj tagoj s-ro Livingstone Jenkins, londona samideano, redaktis, presis kaj eldonis gazeton "Inter Ni", kies celo estis prezenti la "internan ideon" de Esperanto. S-ro March aranĝis kun li, ke iom da spaco en ĉiu numero de "Inter Ni" estu dediĉita al la Budhisma vidpunkto, kaj s-ro March preparis kaj redaktis tiun parton. La artikoloj tiel aperintaj altiris la atendon de aliaj budhanoj kaj interesatoj en kelkaj landoj, kiuj skribis aprobante al s-ro March, kaj el la rezultanta korespondado fondiĝis Budhana Ligo Esperantista kun ĉirkaŭ deko da anoj, kaj s-ro March kiel unua prezidanto.

La aranĝo kun "Inter Ni", spite de la bonvolo de s-ro Livingstone Jenkins, ne povis longe daŭri, ĉar iuj el la Kristanoj, kiuj plejparte subtenis lian laboron, ne toleris ke la dokrinoj de nekristana religio trudu en la gazeton.

Intertempe la Budhana Loĝio en Londono disiĝis de la Teozofia Societo kaj fariĝis sendependa, kun propra anglalingva gazeto “Buddhism in England”, kies redaktoro estis s-ro March. Tial ni trovis en la numero de julio 1926 de “Buddhism in England” tutan paĝon en Esperanto, kaj samtempe eldoniĝis kun tiu ĉi anglalingva gazeto folion en Esperanto por alvoki esperantistojn-budhanojn, ke ili aniĝu al Budhana Ligo Esperantasta. La oficistoj de la Budhana Loĝio bonvole permesis ke la nova Ligo uzadu spacon en “Buddhism in England” por ĝiaj informoj kaj artikoloj en Esperanto, de tiam ĝis aprilo 1930. En la numero de aprilo 1927 ĝi raportis pri vizito al Londono de la eminenta esperantisto s-ro Kenĵi Ossaka el Tokio, kaj aperigis artikolon de li pri Budhismo kaj Esperanto en Japanio. Serio da artikoloj pri Budhismo el okcidenta vidpunkto, kaj traduko de la Oka Libro de “Lumo de Azio” (Light of Asia - poemo de Sir Edwin Arnold) aperis parton post parto en tiu ĉi rubriko de la Ligo.

Organo de Esperantista Ligo, kiel malgranda fako en nacia gazeto kiel “Buddhism in England” ne povis taŭge daŭri. Tial, en decembrlo 1930, oni alsendis apartan multobligitan bultenon al ĉiuj anoj de la Ligo, kun la celo starigi propran gazeton. La dua bulteno aperis post tri monatoj, kaj post la proksima kvaronjaro aperis numero tri kiel presita gazeto kun la titolo “La Budhismo”.

“La Budhsismo” aperis proksimume tri-foje en ĉiu jaro ĝis la numero 18 en aŭgusto 1936. En siaj numeroj ĝi eldonis poparte vortaron de budhismaj terminoj kaj tradukon de Dhammapada, krom diversaj artikoloj kaj aliaj tradukoj.

Fine s-ro Yoxon, kiu redaktis la gazeton, trovis la taskon tro streĉa por li pro la postuloj de sia profesia okupo kiel hospitala sekretario, kaj devis rezigni la penadon. Venis la dua mondmilito. S-ro March, kiu loĝis tiam en la insulo Guernsey, kiam ĝin okupis la germanaj militistoj, forportiĝis en koncentrejon en Germanio (kie, ni flanke notu, li instruis Esperanton al siaj kunmalliberuloj, malgraŭ malpermeso de la koncentrejestro). La ligo restis neaktiva dum ĉirkaŭ dek jaroj.

En 1946, s-ro March, ree libera kaj volanta restarigi kontakton inter la esperantistaj budhanoj, fondis tiel nomatan rondiraĵon: speco de gazeto en nur unu ekzemplero, kiu sendiĝis de ano al ano; ĉiu ano aldonante artikolon aŭ tradukon verkitan de si. Unu ano de la rondiraĵo pli poste fariĝis la dua prezidanto de la Ligo, nome Rudolf Petri (nun konata kiel Rev. Anuruddha), kaj alia ano estis fraŭlino Margaret Bowden.

Estis feliĉa tago por la Ligo, kiam fraŭlino Bowden aniĝis al la rondiraĵo, ĉar dank' al ŝiaj energiaj klopodoj la anaro de la Ligo kreskis kaj ree vigliĝis. Ŝi rekomencis la eldonon de kvaronjara organo sub la titolo "La Budha Lumo". Kvankam ĝi estis nur multobligita produktaĵo, ĝia formato estis taŭga kaj bone preparita, kaj la enhavo interesa kaj instiga, eĉ inspira por la samreligianoj. La japanaj anoj multe helpis per tio, ke post nelonge ili produktis ĉiun alternan numeron. Anstataŭita de tiu ĉi pli disvastigebla kaj pli konservebla gazeto, la rondiraĵo ripozis de sia rondirado, post la plenumo de tre utila rolo en la historio de la Ligo.

Jean Ribillard redaktis la novan organon dum tri aŭ kvar jaroj, ĝis lia sanstato devigis lin forlasi Francion por malproksima insuleto en la oceano Pacifika. En 1959 aperis "La Budha Lumo" kiel presita gazeto, je la 60a numero, presita de Rudiger Eichholz ĉe Esperanto Press en Oakville, Kanado. Tre bele ĝi aspektis, kaj enhavis 12 paĝojn da interesaj verkaĵoj kaj informoj. La numero 61a estis preparita en Japanujo kaj aperis multobligite, kiel antaŭe, sed numero 62 ree aperis presite, tiel same kiel numero 60, sed bedaŭrinde tiu estis la lasta numero.

Je la 28a de marto 1961 mortis la agema fervora sekretario-kasistino f-ino Bowden. Tuj evidentiĝis, kiel la tuta organizaĵo restis sur ŝiaj maldikaj ŝultroj, ĉar la gazeto kaj ĉiuj aliaj agadoj de la Ligo ŝajne velkis kun ŝia morto.

Sed post kelkaj monatoj, leviĝis alia bravulo por surpreni la ŝarĝon de la budhana esperantista mondo, nome Marcel Bury, kiu elsendis cirkuleron "budhana kuriero", por kunkudri la fadenojn, kiujn minacis disfaliĝo. Kun espero en la estonteco li ankoraŭ diligente eltenis, por ke la organizaĵo ne forvelku, sed kresku kaj disvastiĝu por la bono kaj la beno de venontaj generacioj.

(el "budhana kuriero", n-ro 2, 1975)